


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
ĜIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
11 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,1 SV.FR.

F. HUYGHE

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LA VENTO RAKONTAS.....

Sinjoro Valdmар estis klera homo, oni diris ĉie. Kaj esploristo, oni supozis. Ĉar ofte oni vidis fumon elĝi el la kamentubo en la somero, kaj tio okazis je malordinaraj tempoj! Li apartigis sin kaj ĉiuj pordoj estis zorge ŝlositaj. Jes, dum tagoj kaj noktoj li ofte laboradis; sed al neniu li parolis pri tio! Ne, al neniu. Li volis profunde penetri en la sekretojn de la naturo; il praktikis sekretan sciencon, li serĉis la plej bonan, kio estas surtere, kaj tio estis — laŭ sinjoro Valdmар — oro!

Oron li serĉis, li mem volis ĝin fari! —

Ne mirige, ĉu ne, ke lia kamentubo tial daŭre fumis kaj, ke en la ĉambro, kie li laboris, ofte estis granda ardo de fajro kaj nuboj el diversaj haladzoj.

Ha, ofte mi vidis lin laboradi, diris la vento. Kaj foje mi kriis tra la kamentubo: „Ne faru tion, sinjoro Valdmар! ne plu okupu vin pri tio, ĉar la rezulto estos nula, kaj nenion alian vi trovos ol cindron kaj karbon!”

Sed la kastelmastro ne atentis mian konsilon. Kaj monon li ĉiam pli bezonis, kaj oron ne trovis!

Iun tagon mi rimarkis, ke la stalo estas tute malplena. La bel-egaj nigraj ĉevaloj for: venditaj. Kaj ankaŭ la multekostaj oraj statuetoj kaj arĝentaj vazoj el la riĉaj salonoj baldaŭ estis for. La enhavo de kofroj kaj ŝrankoj rapide malgrandiĝis, — jes, eĉ la brutaron la kastelestro devis vendi! Ĉio forfandiĝis en tiu neniam satigebla fandujo. Sed neniun grajnon da oro ĝi pro tio redonis! —

Kaj fariĝis ĉiam pli malbone. La servistaro estis maldungata, la keloj malpleniĝis, — kaj ofte mankis multaj aĵoj, kiujn antaŭe ili havis abunde. La kastelo pli kaj pli ruiniĝis; la fenestroj kaj pordoj

ekhavis fendojn, — mi povis en- kaj eliri laŭplaĉe, diris la vento; neniŭ malhelpis min! Tamen la kamentubo ankoraŭ daŭre fumis. Sekve oni kuiradis, vi opinias. Ho ne, — la fajro brulis nur sub la fandujo, sed manĝaĵoj!? La tri filinoj vivis mizere! Kaj sinjoro Valdmар iĝis ĉiutage pli maljuna, pli maldika. Dumtage li laboradis, avide serĉante oron, kaj nokte li maldormis multajn horojn, daŭre pensante. Kaj ekdorminte li sonĝis. Pri oro!

Liaj okuloj iĝis sovaĝaj, liaj haroj kaj barbo grizaj; preskaŭ ĉion, kion li posedis, li jam oferis al sia iluzio kaj ankoraŭ li ne cedis! Ho, ĉien mi povis trapenetri, diris la vento: la tegmento kun truoj, la fenestro-vitroj rompitaĵ, malpleno kaj mizero ĉie: en la salonoj kaj en la turoj. Kurtenoj kaj tapiŝoj iĝis maldikaj kaj senkoloraj, la vestaĵoj de la filinoj estis malriĉaj kaj eluzitaj. Ho, kiom da diferenco kompare al la antaŭa tempo, kiam tra la luksaj salonoj la kastelmastrino paŝis! —

Kelkfoje — diris la vento — mi klopodis alporti iom da gajeco per mia kantado; sed mi aŭdis mian propran voĉon kiel plendkanton! Post tio la vintro venis kaj mi ĵetis neĝon sur la tegmenton kaj ŝtopis la fendojn. Sed tamen restis malvarme en la kastelo, ĉar ne plu estis hejt-materialo. Kaj la moŝtaj sinjorinoj devis serĉi varmon en siaj litoj; ili kuŝis malgaje meditante pri pasintaj tempoj. Ho, ili sopiris denove sidi hejmece ĉirkaŭ krakanta kamenaĵo.

Kaj sinjoro Valdmар ankoraŭ ĉiam pensis, ke liaj klopodoj havos sukceson; ho, certe venos pli bonaj tempoj, li diris al siaj tri filinoj. Post la vintro ja venos la printempo! — Sed la fraŭlinoj ne plu kredis. Ili jam tiom longe esperis kaj atendis!

Ankoraŭ la kastelo estis lia, sed proksimiĝis la tago, en kiu li devos transdoni ĝin al aliaj homoj por ricevi monon!

Iun matenon — rakontis la vento — mi aŭdis lin paroli al araneo; kun atento li rigardis la araneaĵon, la artan kaj pacience teksitan reton, kaj li diris: „Vi beleta, malgranda ŝpinanto! De vi oni vere povas lerni, kio estas „persistado”! Eĉ se mi dis-ŝirus vian reton, vi tamen ĉiufoje denove komencus. — Pacienco, — pacienco, kaj persistado! Espero kaj pacienco kondukas al potenco! Jes, tiel estas!”

Estis Paska dimanĉo. Rave la suno brilis kaj de ĉiuj flankoj alŝvebis la sonoj de la sonoriloj trans la kampoj. Ankaŭ en la Borbju-kastelo oni aŭdis la sonoradon kaj la fraŭlinoj komprenis, ke estas Pasko. Ili staris antaŭ unu el la difektaj fenestroj kaj iliaj rigardoj vagis trans la kampoj; tiuj kampoj, kie ili mem pli frue senzorge kaj gaje ĉirkaŭvagis!

Kaj malsupre, en sia „laboratorio”, sinjoro Valdmар streĉe laboradis. La sonoradon li tute ne aŭdis kaj lian animon okupis tute aliaj aferoj; atente li rigardadis vitran retorton — oh, subite li staris najlita al la tero! Liaj okuloj sovaĝe kaj strange rigardis! Lia vizaĝo estis pala, senkolora; liaj vestoj kaj barbo estis plenaj de cindro — kaj en la mano li daŭre tenis la retorton! Sed kio estis tio? Jen radiis io en la vitraĵo..... ĝi brilis pro la suno! Liaj manoj ekstremis kaj subite li kriis, tremante pro emocio:

„Trovita! oro! oro!”

Tiam subite tintado de vitro — sinjoro Valdmар eligis krimon..... el liaj manoj jam falis la retorto kun la brilanta oro! Jen ĝi kuŝis en fragmentoj — jen kuŝis liaj espero kaj feliĉo detruitaj!

Nu, — diris la vento — tiam mi rapidege forflugis de la Borbjukastelo! Sed ne longe mi forrestis. Jam en la aŭtuno mi revenis; la tagoj estis mallongaj, la vetero estis malsereena kaj trankvila; mi estis tamen gajhumora, mi blovis plenpove kaj forpelis la nubojn, por ke la suno varmigu la teron. Ĝi brilis ankaŭ sur la Borbjukastelo, sed tien ĝi ne alportis lumon kaj ĝojon. Venis vizitanto, sed ne amiko li estis! Tion mi tuj vidis kaj ankaŭ aŭdis: ĉar venis Ramel de Basnas kaj li postulis monon, la tutan monon, kiun li pruntis al sinjoro Valdmар. Kaj se li ne ricevos ĝin, li postulos la Borbjukastelon por si.

La moŝtaj sinjorinoj silente aŭskultis liajn vortojn; ili sentis kompaton al la patro. Precipe Ida kaj Dorotea estis tre malĝojaj kaj ili longe ploris; sed Johanino ne montris unu larmon; ŝi staris ĉe la fenestro, fiera kaj pala, la manojn kunpremitaj..... Ne estis mono, estis nenio — tion ŝi sciis!

Kiom eble plej forte mi blovis tra la kastelo, tra pordoj kaj fenestroj, tra fendoj kaj breĉoj; dum momento regis terura trablovo, kaj mi klopodis fari ĝin kiom eble plej malvarma kaj malmilda, ĉar mi opiniis, ke la nebonvena vizitanto pro tio rapide foriros kaj rezignos enloĝadon en la kastelo!

Jen mi aŭdis lin diri, ke li al sinjoro Valdmар — lia ŝuldanto — permesas, loĝi dum la lastaj vivojaroj en la kastelo; je lia miro la favoro ne estis akceptata. Fiere la kastelmastro sin levis, — ne, li ne deziris ricevi favoron! Tiam mi subite komencis blovegi kaj fajfegi, mi batis la tegmenton kaj la murojn, fajfis tra la niĉoj, derompis grandan branĉon de la maljuna tilio, kiu staris sur la kastelplaco, kaj ĵetis tiun antaŭ la internan pordegon; estis, kvazaŭ tie kuŝis granda balailo, kaj mi pensis: jen, per ĝi ili povus forbalai tiun viron!

Ili bone kaŝis sian ĉagrenon, sinjoro Valdmар kaj ankaŭ la filinoj. Fakte ili posedis nur la vestojn, kiujn ili surmetis, kaj la juvelskatolon, de la mortinta kastel-mastrino, sed ne estis juveloj aŭ aliaj ornamaĵoj en ĝi. Kaj ankaŭ la frakasitan retorton ili posedis, en kiu, je la Paska dimanĉo, sinjoro Valdmар vidis la belbrilaron! La oron, por kiu li oferis sian tutan havaĵon! Kiel grandvaloran juvelon li konservis la pecojn, kaj kiam li forlasis kun la filinoj la kastelon, li tenis ilin zorge sub la mantelo.

Jen ili foriris kvarope. Estis malĝoja eliro, — ĉagrena fino de granda beleco kaj riĉeco!

La maljuna, iam potenca kastelestro, paŝis pene inter la filinoj Ida kaj Dorotea. Liaj okuloj rigardis malsupren al la tero, tiu tero, kiun li neniam revidos, al kiu li neniam revenos.

Johanino venis lasta. Ĉiufoje ŝi returnis sin; ĉu eble ŝi atendis miraklon, per kiu ili povos reiri al sia kastelo?

Mi ne scias — diris la vento — sed mi pensis: la feliĉo ja forlasis ilin! Kaj mi vidis, kiel ili pluiris kaj mi karesis la vangojn kaj grizajn harojn de la maljunulo. Ili sekvis la vojon, kiun ili ofte veturis en belega kaleŝo, kaj ili iris almozpetante tra la kampoj al iu malnova, kaduka kabano, kiun ili povis lui per malgranda sumo. Ĝi estis malvarma, kaj malkomforta; korvoj kaj kornikoj flugis ĉirkaŭ la tegmento kaj kriis: „El la nest', el la nest'; kra! kra!” — Estis tute ne plezure aŭdi tion, diris la vento, mi do rapide forflugis trans arbaroj, kampoj, kaj marĉoj, ree al la maro, de kiu mi venis!

Sed vi certe deziras aŭdi, kio okazis plue al sinjoro Valdmар kaj liaj filinoj? Nu, la vento ankaŭ tion rakontu: Okazis pli ol kvindek jarojn poste — diris la vento — kiam mi vidis la plej junan filinon, Dorotea, lastfoje. Ŝiaj patro kaj fratino jam mortis kaj ŝi loĝis tiutempe en malnova, mizera dometo ie sur erikejo proksime de la urbo Viborg. Maljuna kaj velkinta ŝi estis — ho, multon ŝi povus rakonti! La dometo fakte malbeligis la erikejon, opiniis kelkaj homoj, sed tamen oni lasis ĝin, ĉar la cikonioj venis ĉiujare nesti sur la tegmenton kaj ilin oni ne volis forpeli. Pro tio Dorotea povis resti; al la cikonioj ŝi ŝuldis tion!

Ofte ŝi sidis meditante en la soleca dometo; malbonan tegmenton ŝi havis super si, mi ĉiam devis atenti ne tro forte puŝi ĝin. diris la vento —, sed tamen la tegmento ŝin ŝirmis, ĉar la cikonioj estis sur ĝi! Kaj ofte ŝi murmuris neaŭdeblajn vortojn; sed iam mi tamen komprenis. „Aĥ, aĥ,” ŝi diris mallaŭte, „la vento ĝemas tra la kano, kaj ankaŭ la homoj tiel ĝemas! Ne, ĉe la entombigo de sin-

joro Valdmар ne kantis infanoj kaj nur la plej malgranda sonorilo sonis! Fratino Ida jam ne vivas — edzino de kampulo: malriĉa kampulo edziĝis kun la plej aĝa filino de iam potenca bienpose-danto. Ho jes, tio estis forta bato por mia malfeliĉa patro... Sed, ho ve, ĉiu ĉagreno iam finiĝas!... Jam ili mortis kaj ripozas en la nigra tero!... Sole mi, malfeliĉa virino, restas en la vivo!”

Tion murmuris la maljuna Dorotea.

Kaj Johanino? Nu, ŝian vivhistorion mi mem plej bone scias, diris la vento. Ŝi estis brava kaj fiera — ŝi eklaboris por gajni la vivpanon. En viraj vestoj ŝi dungigis sin sur ŝipo, ŝi estis silentema kaj nealirebla, sed bone ŝi faris la laboron! Tamen ŝi ne povis grimpi — kaj iam en malluma nokto mi kunprenis ŝin el la masto en la maron! Neniu sur la ŝipo iam eksciis, ke ŝi estis knabino —; mi kredas, ke mi faris bone. Ŝi ripozas en la maro.....

Kaj iun dimanĉon — estis Pasko, kaj ĝuste tia mateno, en kia sinjoro Valdmар trovis sian oron — mi glitis trans la dometo de Dorotea kaj volis eniri tra truon en la muro, kiam subite mi aŭdis malĝojan kanton; mi aŭskultis..... jes, la maljuna Dorotea mallaŭte kantetis!

Sed tuj poste silentiĝis kaj enirante mi vidis la maljunulinon kuŝanta sur la lito. La suno surlumis ŝian brunan sulkan vizaĝon..... facile mi ŝvebis super ĝi.....

Ŝi estis mortinta.

Malgranda sonorilo sonis, kiam oni enterigis ŝin. Kaj super la tombo mi aŭdigis mian kanton.

Tion la vento rakontis.

„Fabeloj de H. C. Andersen.”

Trad.: VANE.

VORTOJ EL ALBUMO DE S.RO FELIX MOSCHELES, LONDONO.

Ekzistas homoj, al kiuj la aĝo blankigas la harojn, sed tute ne tuŝas la koron, kiu restas ĉiam en plena freŝeco kaj juneco kaj ĉiam kun egala forto batas por ĉio bela kaj bona. Ĉiufoje kiam mi vidas tian homon, mi diras al mi: „Jen estas bela minuto en mia vivo!”

(unua kongreso esperantista en Boulogne-sur-Mer)

L. ZAMENHOF.

20. LA FLOROJ DE L'GARDENO. *)

G G G D G D a \bar{G} \bar{G} D

1:G 5 | 1 . 2 3 2 | 1 . 7 1 | 2 3 4 3 2 1 | 2 . . 5 |

La floroj de l'garde-no jam longe dormas nun, Ba-

\bar{G} G D G D G D a \bar{G} \bar{G} D G

1 . 2 3 2 | 1 . 7 1 | 2 3 4 3 2 1 | 2 . . 3 4 |

lan-cas siajn ka - pojn sub la brilanta lun'. En

\bar{D} G \bar{C} D a D C D \bar{C} C D G D a

5 3 4 5 | 6 . 5 4 2 3 | 4 4 3 5 | 2 . . 0 |

sonĝo tremas la tili', murmu - re flustras ĝi:

Dor-

D a D e D D C \bar{G} D⁷ G

5 . 3 2 . | 3 . 2 1 2 3 4 | 5 1 2 3 2 | 1 . 0 ||

Dormu nun, dor - mu nun fi - le - to dormu nun.

mu nun dormu nun fi - le-to dormu nun.

La birdoj dolĉe kantis, dum brilis hela sun';
 Sed ili jam kuŝiĝis en siaj nestoj nun.
 Aŭdiĝis grilĉirpado nur, — ekdormis la natur'.
 Dormu nun, fileto!

La dormigulo kaŝe spionas tra l' fenestret',
 Ĉu ie ne jam kuŝas en lito infanet';
 Kaj maldormantan tie ĉi dormigas sorĉe li.
 Dormu nun, fileto!

Foriru, dormigulo, ĉar dormas mia fil';
 Li fermis la okulojn, ripozas en trankvil'.
 Sed morgaŭ min la bluokul' salutos de l'karul'.
 Dormu nun, fileto!

W. v. Zuccalmaglio, Germanujo, 1840.

*) El: Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.

Prezo: 0,35 gld. aŭ tri respondkup.

AL MIA KNABO.

Vi neniam estis kun aliaj,
 Vi neniam partoprenis ludojn,
 Dum vesperaj horoj en mans-
 ardo
 Izolita, ludis vi preludojn.

Kiam luno arĝentumis nokton,
 Vi kaŝiris al laŭbeto parka,
 Kaj al strigoj rondokulaj
 flustris
 Poezion dolĉan de Petrarka.

Vi ne estis ido de l'nuntempo,
 Vin ne naskis tango kaj fok-
 strotoj
 Mezepoka eta kavaliro,
 En la revoj — brava Don-
 Kihoto.

Eĉ ĝis nun vi restis revemulo.
 „Filizozo” — nomas vin naj-
 baroj.
 Vivosencon legas vi en steloj
 Kaj feliĉon serĉas trans la
 maroj.

Riga, 1937.

LUDMILA JEVSEJEVA.

ENIGMOJ

1. Kun **m** estas korpoparto
 Kun **p** estas manĝaĵo
 Kun **r** estas besto
 Kun **v** estas sencela klopodado.
2. Kun **l** estas deviga regulo
 Kun **n** varmo ĝin detruas
 Kun **r** estas reganto
 Kun **s** estas meblo.

Spis, Nová Ves (Ĉeĥosl)

J. HARGAS.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis 1 Oktobro '37.

LA SOLVOJ EL NO. 9.

a	n	t	a	ŭ
ŭ				
g				
u	n	u		
s				
t				
o	n	k	l	o

e	ĉ
ĉ	e

Premion gajnis: S.ro Toorneman, Deventer (Ned); F.ino Menot, Orléans, (Franc).

La eraro en la sunhorloĝo estis jena: Ili dividis la cirklon en 12 partojn, anstataŭ en 24, kio necesas por sunhorloĝo. Kiam do estis la 4a horo, la sunhorloĝo nur montris la 2an!

La premiojn gajnis: S.ro F. Maebe, Deinze (Belg), S.ro Toorneman, Deventer (Ned).

MIA METIO (premiita verkaĵo).


Mia metio estas la kamplabor'
 Kiun mi laboras kun gaja kor'
 Ĉar tiel volis la patro mia,
 Ke mi laboru en hejmo nia.
 Gjelekovec (Jugosl)

Ĉion ĉi la patro instruis al mi,
 Kaj nun mi devas danki al li.
 Ĉio ĉi estis antaŭe bona ĝis kriz-aper'
 Sed nun la vojo kondukas al malesper'.

ANDROLIC.

AL LA EKSTERLANDAJ ABONANTOJ.

Malgraŭ niaj instigoj multaj ankoraŭ **ne** pagis sian abonkotizon por la jaro „Julio '37—Julio '38. Se oni ne deziras daŭrigi sian abonon bonvolu sciigi tion al la administracio de „La Juna Vivo” antaŭ ol komenciĝas la nova abonjaro. Kiu ne faris tion, ŝuldas almenaŭ la aperintajn numerojn! Ni nun lastfoje petas al ĉiuj nepagintoj: Sendu baldaŭ la abonkotizon, rekte al ni, aŭ al nia peranto en via lando (vidu paĝon 40).



„LA TRIA DE DEKSTRE ESTAS DE MIA PATRINO!”

Faru verkaĵojn laŭ la supra bildo kaj sendu ĝin antaŭ 1 Oktobro '37 al: red. „La Juna Vivo”, West-Graftdyk, Nederlando. La verkinto de la plej bona verkaĵo ricevos premion.

Tre rekomendinde estas, rakonti laŭ la bildo en grupkunvenoj!

OFICIALAJ POŝTKARTOJ KUN ESPERANTO-TEKSTO.

La poŝta administracio en Nederlando eldonis tre belajn ilustritajn poŝtkartojn kun nederlanda- kaj esperanta tekstoj. La surprisita poŝtmarko montras valoron de 7½ cendoj, t.e. la afranko de eksterlanda poŝtkarto. La poŝto vendas la kartojn por la sama prezo. Do la karto mem kun la bela bildo estas senpaga. Espereble la kartoj estos multe uzataj!

Ciu, kiu varbos 2 abonantojn je „La Juna Vivo” donace ricevos la novan kantaron „LJV”.

SLOVENIO, LA NEKONATA LANDO.

Estante gasto de la redaktorino de „La Juna Vivo”, mi volas nur mallonge informi la legantojn de „La Juna Vivo” pri mia bela patrujo.

Slovenio estas nordokcidenta parto de Jugoslavio kaj limas norde je Aŭstrio, oriente je Hungarujo kaj okcidente je Italujo. La loĝantaro apartenas plejparte al la slava gento kaj nomiĝas Slovenoj. Ili estas tre kleraj kaj havas altgradan civilizacion.

Kiam oni veturas tra la lando, oni preskaŭ ne rimarkas ian diferencon inter mezeŭropaj ŝtatoj kaj nia lando. La popolo estas tre gastama kaj gaja kaj ege ŝatas humoron.


Preskaŭ 99 % de la loĝantaro apartenas al la katolika religio; post la mondmilito, kiam fondiĝis jugoslava ŝtato, enmigris ankaŭ kelkaj Serboj (plejparte oficistoj kaj laboristoj), kiuj konfesas la ortodoksan religion. En pli grandaj urboj estas ankaŭ kelkaj protestantoj (resto de la reformacia tempo).

Slovenio havas surfacon de proksimume 20.000 km² kaj nombras 1.060.000 da loĝantoj (la tuta ŝtato havas proksimume 15.000.000 da loĝantoj).


Slovenio estas tre montara lando, nur ĉe riveroj ekzistas pli grandaj ebenaĵoj. La plej bela regiono de Slovenio estas sendube Gorenjsko, kiu kuŝas en la angulo inter Aŭstrio kaj Italujo (nordokcidenta parto de Jugoslavio). Je itala limo etendiĝas majestaj Juliaj Alpoj kun la plej alta supro Triglav (2863 m), ankaŭ la plej alta monto en la tuta ŝtato. Norde je aŭstria limo leviĝas krutaj Karavankoj kun la plej alta monto Stol (2239 m). Du belegaj kaj romantikaj valoj, tra kiuj fluas riveroj Sava-Bohinjka kaj Sava-Dolinka, ornamas la regionon.

La perlo de tiu ĉi regiono estas Bled kun la samnoma lago en la mezo, sur kiu leviĝas beleta preĝejo. Tien ĉi venas ĉiujare, somere kaj ankaŭ dumvintre miloj kaj miloj da gastoj kaj turistoj el en-kaj eksterlando. Tie ĉi havas ankaŭ la reĝa familio sian belegan kastelon „Suvobor”.


En proksimo de Jesenice, kie mi instruas, troviĝas beleta montara vilaĝeto Sv. Kriz, fama kaj tre vizitata somerrestadloko, elirejo al la plej konata kaj vizitata monto Golica, kie dum monatoj majo kaj junio kreskas belaj narcisoj. Ĉiujare oni ilin amase ŝir-kolektas.



Ljubljana, monahineja
pređejo, katedralo.



Ljubljana, čefurbo de Slovenio
Tripointaro, Kastelo.



Kranjska gora, fama somerrestadejo en bela kaj
romantika Sava-valo en Slovenio.



Sv. Križ.
Alpa somerrestadejo en Slovenio kaj bela skitereno.
Multvizitata dum somero kaj ankaŭ dum vintro.

Mi menciu ankaŭ la vilaĝon Kranjska gora, kiu estas ankaŭ tre vizitata somerrestadloko. En proksimeco de Kranjska gora troviĝas la plej alta skisaltejo en la mondo: Planica, kien ĉiuvintre venas multaj skikurantoj el preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo.

La plej granda urbo de Slovenio estas Ljubljana, tre bela urbo kaj ankaŭ tre moderna. De sur la kastelo oni havas belegan ĉirkaŭrigardon al ĉiuj direktoj. La urbo havas nun proksimume 80.000 da loĝantoj. Tie troviĝas universitato kaj multaj mezlernejoj, metilernejo, muzika altlernejo ktp.

Ankaŭ la Esperanto-movado estas en Slovenio sufiĉe forta. Preskaŭ en ĉiu pli granda loko estas esperanta klubo, plej fervoraj esperantistoj estas en Ljubljana, kie oni ankaŭ eldonas kaj redaktas interesan kaj bele-ilustritan esperantan gazeton „Niaj Vizaĝoj”, kiu jam nun havas abonantojn en preskaŭ 50 landoj.

Tiom pri mia lando kaj mi nun esperas, ke vi prenos la landkarton kaj serĉos en ĝi mian karan patrujon kaj mi deziras al vi bonan sukceson.

GOLOBIC PETER.

MI AŬDIS.

ĈAR MORTIS PANJO AL MI.

Mi aŭdis
Voĉon tre dolĉe sonantan,
Al mi la lulkanton kantantan —
Mi aŭdis
Voĉon pro zorgoj mallaŭtan —
Mi aŭdis
Voĉon pro malĝojo plorantan:
Mi aŭdis
Voĉon de mia patrino.

Damjen Vahen.
El la kolekto „Miaj Vojoj”
Ljubljana (Jugosl).

Suno —,
Kien vi sendis viajn radiojn,
Kiu matene vekis min?
Birdoj —,
Kien forflugis vi senadiaŭe,
Kial ne kantis vi matene al mi?
Mi scias!
Nuboj kaŝis vin, suno,
Pro ventegoj forflugis la birdoj —
El mia koro
Doloroj forigis gajecon —
El mia vizaĝo
Zorgoj forpelis rideton,
Ĉar mortis panjo al mi!

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.

LA VOJAĜO AL SVISUJO KAJ PARIZO.

(La redakcio ricevis jenan leteron de juna partopreninto el Anglujo)

KARA KAMARADO.

Mi deziras esprimi mian dankon pro la treege feliĉa kaj interesa vojaĝo, kiun vi aranĝis por ni. Mi havas mil memorojn de la bonaj nederlandaj amikoj kaj de la fremdaj esperantistoj kiujn ni renkontis en diversaj urboj en diversaj landoj.

Estis mia unua vojaĝo al Eŭropo kaj mi certe faris bonegan komencon. Miaj amikoj en la oficejo en Londono estas tre ĵaluzaj, ke mi povis iri tian grandan distancon kaj samtempe elspezis malgrandan sumon. Mi havis tre bonajn okazojn paroli kun la francoj, belgoj, kaj svisoj en iliaj lingvoj, kiujn mi lernis en la lernejo. Mi diris al ĉiuj, ke ili devas lerni la internacian lingvon, por pli bone kompreni la alilandulojn.

Estas tre bedaŭrinde ke la angloj estas insululoj, ni ne progresas multe rilate internaciajn ideojn, sed se ni tre ofte propagandas, ni sendube sukcesos. Ni povas paroli pri nia bonega vojaĝo kaj ili komprenos, kiel Esperanto rompas la barikadojn inter la nacioj, kaj ankaŭ plifaciligas por la homoj la vojaĝadon alilanden.

Estis iom bedaŭrinde, ke kelkaj amikoj ne povis paroli kun ni. Mi esperas, ke ĉiu el ili intencas lerni la lingvon, tiel ke kiam ni renkontos nin denove, ni povos pli bone kompreni unu la alian.

Mi esperas, ke vi aranĝos multajn de tiaj vojaĝoj en la estonteco, tiam mi povos vidi denove miajn nederlandajn amikojn.

Kun amika saluto,

RONALD GREGORY.

La vojaĝo apartenas al la estinteco. Ni revenis al nia ĉiutaga laboro. Tamen restas la memoroj pli la belaj tagoj, kiujn ni travivis. Restas la memoroj pri la amikeco kaj helpemo kiujn ĉie ni spertis. Ŝajne estis veto inter la amikoj en Liège, Nancy, Bazel, Solothurn, Lausanne, Morges, Geneve, Dijon, Poissy, kiuj el ili plej sukcese agrabligos nian restadon. Oni superŝutis nin per afablecoj kaj sentigis al ni la signifon de la „interna ideo”. Estis ja amo, kiu kreis Esperanton, kaj nun Esperanto kreas amon.

Vin, malproksimaj amikoj, mi plenkore dankas, en la nomo de la tuta karavano mi esprimas la deziron, ke ni iam povos fari por vi, kion vi faris por ni.

(La redakcio)

ĜIS REVIDO!

LEGU!!!!

Nederlando nomiĝas la verda lando. Ni, Nederlandaj Esperantistoj, tamen tute ne estas kontentaj. Ni nur povos esti kontentaj, kiam la tuta popolo parolos nian lingvon, t.e. la lingvo de interfrateco. Kaj ni konfesu, tiun celon ni ankoraŭ ne atingis. Povas ja okazi ke ni, promenante en diversaj urboj kaj vilaĝoj, renkontas homojn, ne havantaj la verdan stelon surbruste. Tio absolute devas fini! Al Holando la honoro ricevi la premion en la internacia vetkuro, kiu nacio parolas unue la tuthomaran lingvon. Lasu al aliaj la „honoron”, kiu havas la plej grandajn militŝipojn, la plej fortan armeon, aŭ fabrikojn por la plej detruigaj bomboj.

La redakcio de „La Juna Vivo” ellaboris planon, por ke ankaŭ la lasta Holandano parolu Esperanton.

Multaj estas la buŝaj kursoj en nia lando, tamen restas multaj personoj, kiuj ne povas partopreni. Por ili la redakcio organizis skriban kurson, tre facilan kaj tre, tre malkaran. La partoprenantoj pagas malpli ol dek guldenojn, malpli ol ok, kvin, tri, malpli ol unu guld., ili pagas nur 80 cendojn!

Por tiu bagatelo oni ricevas:

1. Lernolibron en Esperanto.
2. Klarigon en la holanda lingvo. (16 lecionoj).

Ĉiu aĉetanto rajtas semajne aŭ monate ensendi siajn taskojn, kiujn li ricevos korektitaj. Li nur enmetu poŝtmarkon por la resendo.

La kursano do pagas preskaŭ nenion. Tamen, ĉar certe miloj partoprenos, fariĝos larĝa orfluo al la redakcio. Tamen la redakcio ege timas riĉecon. — „Estas fortaj kruroj, kiuj povas porti lukson.” —

Pro tio ni zorgos konduki la orflumon tiel, ke parto de ĝi venos en la poŝojn de la helpantoj. Kiu estas la helpantoj? Ĉiuj homoj kun bona volo. — Kiu varbos dek partoprenantojn, pagos la kotizon nur por ok. Li do gajnas 1,60 guldenojn en tre facila maniero.

Krome:

Por ĉiuj mil kursanoj ni dislotos kiel premion:

Senpagan vojaĝon, dekkvintagan al Svisujo aŭ Praha.

Ĉiu helpanto havas tiom da ŝancoj, kiom li varbis partoprenintojn.

Kaj ankoraŭ krome:

Kiuj studis plej fervore, ricevos kiel premion senpagan abonon al „La Juna Vivo” dum unu jaro!

Kaj nun al la laboro! Petu kuponlibretojn ĉe la redakcio kaj vizitu ĉiun domon. Vi rajtas preterpasi nur tiujn domojn, kie loĝas homoj pli aĝaj ol okdek jaroj.

Leganto: laboru entuziasme kaj senlace! Laboru, laboru!!!

RED.

MIA KARULO MUDL.

La familiaj cirkonstancoj ne permesis al mi lerni metion. Tial mi ekde mia 14a ĝis 18a vivojaro laboris ĉe kamparano. Mi devis paŝtigi 20 bovojn. Iun tagon la kamparano ordonis al mi peli virbovon, kiu pezis 600 kilogramojn, al la buĉisto. Mi agis laŭ la ordono. Malrapide ni do forlasis la stalon kaj troitis tra la korto. Strange tuŝis min la penso, ke „Mudl”, mia karulo, ne plu longe vivos.

Survoje ni renkontis du buĉistojn, fortaj viroj, kiuj transprenis la virbovon. Mi post la transdono malgaje adiaŭis Mudl.

Per grandaj, dikaj bastonoj la du viroj tuj volis provi siajn fortojn kaj senkaŭze ili batis la beston. Furioze pri tio ĝi liberigis sin kaj kuris en la vilaĝon. Pro sia furiozo la virbovo falis en fosaĵon kaj neniu kuraĝis liberigi la sovaĝan beston el ĝia situacio. Tial unu el la buĉistoj postkuris min, kaj petis min helpi.

Mi konsentis, ne por esti kompleza al la du buĉistoj, sed pro amo al mia karulo.

Post kelkaj minutoj mi do estis ĉe la fosaĵo. Mi vokis la virbovon laŭ ĝia nomo: „Mudl”, donis al la besto peceton da salo, karesis ĝin kaj sen helpo de iu ajn mi malrapide daŭrigis kun mia karulo la iradon — ĝis la buĉejo. Multaj homoj miris pri tio kaj insultis la kruelajn buĉistojn, kiuj senkaŭze turmentis kaj incitis la virbovon.

Pro tio mi do diras: „Neniam turmentu beston, ĉar ĝi sentas la doloron same kiel vi!”

J. Reithofer, Freiland (Aŭstr).

El „VERDA REVUO”.

Por komencantoj.

SUR LA STRATO.

Sinjoro alparolas ŝoforon:

„Kiom da mono postulas vi por veturigi min al la stacidomo?”

Ŝoforo: „Kvin frankojn”.

Sinjoro: „Kaj por mia kofro?”

Ŝoforo: Ho, por kofro mi neniam postulas ion”.

Sinjoro: „Tre bone! Tiam transportu mian kofron al la stacidomo: mi iros piede”.

LA KONTRAŬO.

Barono promenas frumatene laŭ kamparvoĵeto. Li renkontas almozulon, kiu diras al li:

„Bonan tagon, barono. Kiom frue vi promenas!”

„Mi promenas, por trovi iom da apetito por mia matenmanĝo. Kaj vi, kion vi faras?”

„Ĝuste la kontraŭon: Mi serĉas matenmanĝon por mia apetito!”

VORTLUDO.

Napoleon I, kiu volas diri ofendvorton al kardinalo Saverio: „Ĉu estas vere, ke italoj estas friponoj?”

„Ne ĉiuj, Moŝto, sed **bona parto**”.

ATENTO.

Instruisto al knabo, kiu tro malfrue eniras la klasĉambron: „De kie vi venas do tiel malfrue?”

Knabo: „Kiam mi preter-pasis la konstruatan domon ĉe la angulo oni ĵus suprenlevis brikojn kaj laboristo vokis al mi: „Atentu!”

Instruisto: „Jes, do, kaj nun?”

Knabo: „Mi atentis!”

Parizo (Franc.)

LÉCHELLE.

ANEKDOTO.

Almozulo rakontas sian lastan avonturon: „Mi ne manĝis dum du tagoj. Senespera mi ĵetis min en riveron, sed barkisto reprenis min. Do, ĉu vi volas kredi? Oni donis dudek frankojn al mia savinto, kaj al mi nenion!”

VERA PARADIZO.

Du araneoj, kiuj loĝis en malsama parto de sama preĝejo, foje estis en socia kunveno. Unu el ili plendis pri sia sorto: ĝi loĝis sub la mola rando de l' katedro, kaj ĉiujn dimanĉojn la predikanto, kiu forte manfrapis la randon, kaŭzis al ĝi terurajn horojn.

„Venu loĝi kun mi” diris la alia: „Mi ĉiam restas trankvila: neniu ĝenas min.”

„Ĉu vere? Kaj kie vi trovis tian paradizon?”

„Ho, mi ĉiam restas en la kesteto de la almozoj!”

Ĉu la araneoj loĝis en la sama parto de la preĝejo? Kie ili foje kunvenis? Kial unu plendis pri sia sorto? Kiam la predikanto kaŭzis al ĝi timon? Ĉu ankaŭ la dua araneo plendis? Kial ĝi loĝis trankvile? Kie ĝi loĝis? Ĉu oni do ĵetis multan monon en la kesteton?

KION ILI VOLUS LERNI.

En punejon envenas du novaj gastoj.

La direktoro ricevas ilin kaj diras: „Tie ĉi vi povas lerni ĉiun ajn metion”.

„Mi volus konduki la ŝafojn en la herbejon!” diras unu.

„Mi preferus fariĝi ŝipisto en la komerca ŝiparo” respondis la dua.

Kien venis la gastoj? Kiu ricevis ilin? Ĉu ili povis lerni multon en la punejo? Kiun metion la unua vizitanto deziris lerni? Kion deziris la dua?

Tasko:

Lernu parkere: „Sur la strato” kaj „Vortludo”. Rakontu per propraj vortoj: „Atento” „Anekdoto” kaj „La kontraŭo”. Traduku kaj lernu parkere jenajn proverbojn:

Ne ekzistas kareso sen intereso. — Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon. Tro akra fajro estas sen daŭro. — Enspezo postulas elspezon. — Ne ĉio brilanta estas diamanta.

SAVITA PER FONOGRAFO.

Iu esploristo en Afriko veturis kun kelkaj kunuloj en boatoj sur la Nilo. Vespere ili albordiĝis kaj starigis siajn tendojn.

Subite venis indiĝeno al la tendoj, kiu klarigis per gestoj, ke la vojaĝantoj estas sur lia tereno kaj devas doni ian kompencon pro tio. Sovaĝuloj volonte akceptas vitrajn perlojn kaj aliajn brilajn objektojn, sed tiu ĉi indiĝeno rifuzis ilin kaj estis klare, ke li deziras pafilojn. La vojaĝantoj tamen posedis nur tri pafilojn, ĉar la aliajn ili perdis, kiam unu el la boatoj renversiĝis. Estis tro danĝere fordoni la tri, ĉar restus al ili neniu pafilo por defendi sin.

La indiĝeno montris sin tre kolera pro tiu rifuzo. Li foriris kaj la vojaĝantoj supozis, ke li provos sin venĝi. Tial ili decidis posteni laŭvice.

Regis trankvilo ĝis noktmezo. Tiam la postenanto rimarkis danĝeron. Li vekis la aliajn. Ili vidis ion tre strangan. Longa vico da dornuoj malrapide alrampis sur la sabla ebenaĵo. Sub tiuj dornuoj tamen brilis la pintoj de lancoj. La stranga fenomeno estis solvita. Alproksimiĝis indiĝenoj kun armiloj, kaj ili faris sin nevideblaj per dornuoj.

Kion la vojaĝantoj povus fari per tri pafiloj kontraŭ tia bando! Ili decidis fuĝi kaj postlasi la tendojn. Subite la esploristo ekhavis bonan ideon. Li metis la fonografon, kiun ili kunportis por distri sin, ekster la tendon. Li funkciigis la aparaton. La fonografo imitis aron da homoj, el kiu ĉiu laŭvice rakontas spritaĵon, sekvata de ridado. Pro tio la indiĝenoj pensus, ke la vojaĝantoj gajigas sin per komikaj rakontoj, sen konscio pri la danĝero, kiu minacas ilin.

Kaj vere la vojaĝantoj sukcesis nerimarkite atingi siajn boatojn, kiuj sen bruo forglitis sur la rivero.

La disko de la fonografo finiĝis. Tiam eksonis sovaĝa kriadado, la indiĝenoj atakis la tendojn, kaj vidis baldaŭ, ke ili estas malplenaj. Kolere ili kuregis al la rivero, sed la boatojn ili ne plu povis atingi per siaj ĵetlancoj.

Kunportante la fonografon, la vojaĝantoj neniam konjektis, ke ĝi iam savos ilian vivon.

Trad. VANE.

La militspirito kaj la patriota egoismo estas la neado de ĉia justeco.

BERTHA VON SÜTTNER. (el „For la batalilojn”).

LA FABELO PRI DIONIZO.

Dionizo vojaĝis iam en sia junaĝo tra Grekio. La vojo estis longa kaj polva; Dionizo fariĝis laca kaj eksidis sur ŝtono por iom ripozi. Antaŭ siaj piedoj li vidis planteton tiom bela, ke li decidis kunporti ĝin hejmen kaj planti en sia ĝardeno.

Li timis, ke la akra suno velkigos ĝin kaj tial prenis senvivan birdon kaj enmetis la planteton. Tiam li daŭrigis sian vojon. La planto forte kreskis en liaj manoj kaj eĉ elkreskis el la birdo-kadavro. Ree li ektimis ke ĝi velkos. Feliĉe li trovis kadavron de juna leono, kaj en tiun li metis la birdon kun la planto. Sed ĝi kreskis ankaŭ el la leona kadavro. Poste li trovis kadavron de azeno, kiu estis ankoraŭ pli vasta kaj li kaŝis en ĝin la tutan trezoron. Kaj antaŭ ol la planto povis elkreski, li alvenis hejme.

Kiam li volis planti la kreskaĵon, montriĝis, ke la radikoj jam tiom forte volvis sin ĉirkaŭ la tri kadavroj, ke ne estis eble maligi ilin. Tial li metis la tuton en la teron kaj jen, la planto rapide kreskis kaj produktis bongustegajn vinberojn. Dionizo multe ĝojis pro tio, elprenis la unuan vinon kaj donis ĝin al la homoj por trinki. — Kaj kio okazis?

Kiam la homoj trinkis la sukon, ili komencis gaje kanti kiel birdoj, post tio ili iĝis sovaĝaj kiel leonoj kaj fine stultaj kiel azenoj.

Trad. VANE.

LUDO (Ne ridu!).

La prezidanto komencas rakonti laŭ komika maniero. Lia celo estas: ridigi la lernantojn.

Tuj, kiam iu aŭdeble ridas, la prezidanto ĉesas paroli kaj la ridinto transprenas lian taskon. Kaj tiel plu!

Buinen.

MARTEN MEDEMA.



KORESPONDADO

Ni ricevis denove kelkajn kantojn. Eble poste ni enpresigos ilin.

Al la partoprenintoj de la „Juna Vivo“-vojaĝo: La konkurso pri la vojaĝo finiĝos je 20 Septembro '37. Sendu viajn verkaĵojn kaj fotojn do antaŭ tiu dato!

LA MIRAKLA STONO DE VAMBEKE.

Iun tagon okazis, ke kampulo el Vambeke fosis en siaj kampoj kaj trovis grandan ŝtonon, en kiu estis cizitaj jenaj vortoj:

Kuŝas sub mi
Mirakla io,
Turnu do min,
Vi vidos kio!

Scivola vidi la miraklon, nia kampulo kunvokis ĉiujn najbarojn, kaj post multe da penado kaj longa laborado oni sukcesis turni la ŝtonon. Kaj kio estis la miraklo? Sur la posta flanko estis skribita:

Mi diras al vi: Multan dankon!
Ĉar vi metis min sur alian flankon.

Trad. VANE.

LULKANTO.

(Melodio de Johannes Brahms, „Guten Abend, gut' Nacht”).

Sur la mola kusen'	Songu ĝojojn mil,
Sub de Dio la ben'	Songu: via lulil'
Kun la dolĉo de lac'	Fariĝas ĉiel'.
Nun ripozu en pac',	Dormu, mia anĝel',
Ĝis la suna radi'	En feliĉo kaj san'
Ree ridos al vi.	Sub de Dio la man'.

Berlino (Germ.)

KARL VANSELOW.



En „La Suno” (japana esp. gazeto) aperis „Kial mi estas Esperantisto” el „La Juna Vivo” No. 9-'37.

La redakcio volonte permesas al ĉiu esperantisto traduki la rakontojn el „La Juna Vivo” en naciajn lingvojn. Ĝi eĉ tre ŝatas tion, ĉar estas bonega propagando. Oni nur aldonu: El „La Juna Vivo”, esperanta gazeto por la junularo kaj komencantoj. Kaj oni sendu ekz. al la red. de „LJV”.



KORESPONDADRESOJ

Francujo: S.ro Lechelle Antoine, 53 Rue emile Duplat Vica par Fresnes sur Escault dez. kor. per il. poŝtkartoj. Respondo garantiata.

Japanujo: S.ro Pejzo Wada, Kitasakaigawa 2, Minato, Osaka, deziras korespondi nur poŝtkarte.

Jugoslavujo: Vojevec Josip, Ljubljana, Glince V 2, interŝanĝas poŝtk. kun tutmondaj gesamideanoj. Respondo certa.

Jugoslavujo: S.ro Stanko Podbevsek, Rodica 13, p. Domzale, korespondas, interŝanĝas esp. prosp.ktojn, il. poŝtk., turism.k. Respondo certa.

Nederlando: S.ro C. Bakker, Dahliastr. 60, den Helder, dez. korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Certe respondos.

Nederlando: G. Blakborn, Middellie, 14 jara knabino dez. korespondi kun geknaboj el ĉiuj landoj.

Nederlando: S.ro C. Krom, Hoogeweg 77, Uitgeest, dez. kor. kun eksterlandaj samideanoj per leteroj kaj kartoj.

Polujo: Paŭlo Mitnik, Varsovio, Nowolipki 36-27, deziregas interŝanĝi ĉiutempe interesplenajn leterojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Polujo: Tadeo Rozwadowski, 12 jara lernanto, Nowy Sazs, ul. Kochanowskiego 44, deziras korespondi kun samaĝuloj pri ĉiuj temoj.

Nederlando: S.ro H. Hollander deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Adreso: Blotenberglaan 1, Ede (Gld.).

Ĉeĥoslovakujo: 10 jara knabino deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun knabinetoj el ĉiuj landoj. Jarmila Cerná, Tesetice ĉe Olomouc.

Francujo: F.ino J. Lair, Instruistino, deziras korespondi pri muziko. Adreso: 35 rue Chartes III, Nancy.

Hungarujo: Mi volas korespondi kun tutmondaj esperantistoj, filatelistoj. Interŝ. poŝtm. E. Blan, Abaŭjsanto, Pönta 40.

Latvujo: S.ro J. Caune dez. kor. kun pentristoj-profesiuloj. Respondo certa. Adr: Limbazu i. 7—12, Riga.

Latvujo: S.ino E. Ilberg dez. interŝ. il. poŝtk. kun s.roj el ĉiuj landoj. Adr: Pasta kaste 844, Riga.

Latvujo: F.ino J. Krievs dez. interŝ. esperantaĵojn (librojn, insignojn) kun la tuta mondo. Audeju i. 10—9, Riga.

Nederlando: S.ino de Bruyn-Blessing, Oosthuizen, deziras korespondi.

Nederlando: 22 jara f.ino dez. kor. per let., poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Respondo certa. H. T. Wiersma, Ten Boer (Groningen).

Svedujo: „La esperantista klubo” de Lund letervesperos la 27an de Okt. '37. Skribu multnombre. Certa resp. H. Pettersson, Kiliansgat. 15, Lund.

Aŭstrio: S.ro Alois Postl, Grazergasse 30, Hartberg, (o. Stm) deziras korespondi kun juna F.ino en la apudeco de West-Graftdyk.

Ĉeĥoslovakujo: 34-jara bona esperantisto dez. kor. pri ĉ.t., letere, interŝ. vidkart. Certa respondo. S.ro R. Trojna, Breclav.

Anglujo: 23 jara studeanto de kor. kaj interŝanĝas poŝtm. kun esperantistoj tutmondaj. R. Bainbridge, 52 Minster Park, Sheerness, Kent.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

30a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Londono. 30 Julio-6 Aŭgusto, 1938. Sekretario, Herongate, Rickmansworth (Herts), Anglujo. La 9an de Julio '37 jam estis enskribitaj 81 kongresanoj!

TRAFa PROPAGANDILO estas jarkolekto de **Literatura Mondo**. Abonprezo 4,50 gld. Specimeno kostas 0,15 gld. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”.

LINGVO LIBRO informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj. Abonprezo por jaro kaj 3 ekz. kune sendataj 0,80 gld. Specimeno 5 c. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”.

NAIAJ VIZAĜOJ estas belaspekta nova gazeto eldonata en Jugoslavio. Ĉiu numero enhavas multajn ilustraĵojn. Jarabono kostas nur 0,65 guld. La revuo estas abonebla ĉe red. „La Juna Vivo”.

VIRINAJ KOLTUKOJ EL SILKO. Trianguloj, kun esperantaj simboloj (amo, paco, frateco). Prezo: 0,68 guld. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”.

INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”. Laboru kantante — kantante oni lernas. Ĉiu do nepre posedu la kantaron! Prezo 0,35 gld.

„LA JUNA VIVO”-TEATRAĴOJ, multe laŭdataj pro la simpla lingvo. Prezo nur po 0,10 c. (aŭ 1 resp. kupono).

„La novaj Vestoj de Reĝo” (triakta, 15-20 infanoj aŭ plenaĝuloj).

„La elektraj Lampoj de la Sinjorino” (unuakta, 3 plenaĝuloj, 2 infanoj).

„La Naskiĝtago” (triakta, 8 infanoj).

„Kion faras la Patro ĉiam estas bona” (8 plenaĝuloj aŭ infanoj, unuakta).

„La tro longa pantalone” (duakta, 4 plenaĝuloj aŭ infanoj).

OP DE BRES VOOR ESPERANTO, de G. J. Bontje. Serio da bonegaj propagandaj artikoloj por Esperanto. Prezo 0,35 gld. Mendebla ĉe „LJV”.

SUR LA VERDA VOJO — de S. Stuit. 70-paĝa libreto, bonaspekta, enhavanta mallongajn rakontojn, epizodojn pri la kursoj en Flandrujo. Pro la simpla stilo tre taŭga por komencantoj. Prezo 0,50 gld. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”.

INTERNACIA LERNOLIBRETO „LA JUNA VIVO”. Pro la simpla, interesa metodo, kaj la tre malalta prezo, ĉi lernilo certe estas rekomendinda en komenckursoj. Oni mendu specimenon!

Prezo: 0,20 guld. (2 resp. kuponoj).

BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO” (I, II, III) estas kaj restas valorplena posedaĵo por ĉiu esperantisto. En kurs- kaj grupvesperoj ili estas nepre bezonataj! Prezo nur po 0,80 gld. Abonantoj kaj grupoj ricevas rabaton.



RICEVITAJ ESPERANTAJ OJ

INTERNACIA EKSPOZICIO, PARIS 1937, MAJO-NOVEMBRO. Faldfolio en pluraj koloroj, eldonita de la Internacia Ekspozicio. Havebla ĉe Esp. Oficejo 34, Rue de Chabrol, Paris. Aldonu respondkuponon.

VIZITU ĈEĤOSLOVAKUJON. Bela, 12-paĝa, riĉe ilustrita broŝuro, senpage ricevebla ĉe la eldonisto: Ministerio de Komerco (turisma sekcio), Praha 1, Ĉeĥoslovakujo.

AŬSTRIO. Nova prospekto, esperantlingva, 20, 5 × 29 cm. Kun kelkaj belaj ilustraĵoj kaj teksto, precipe pri la ĉefaranĝoj porturismaj en Aŭstrio dum somero '37. Esp.-Varbadservo por Aŭstrio, Neue Burg, Wien 1, Aŭstrio.

AL VIENO DUM CIUJ SEZONOJ. 16-paĝa faldprospekto esperantlingva kun bela titolo-paĝo 27 ilustraĵoj, ne laŭ fotoj sed laŭ desegnaĵoj. Petu la prospekton de: Fremdenverkehrsstelle der Stadt Wien, Mariahilferstr. 2, Messepalast, Wien 7, Aŭstrio.

KURESSAARE, SANIGSLIMA KUN MARA KURACLOKO EN ESTONIO. 8 paĝa, ilustrita broŝuro kun multkolere presita kovrilo. Kuressaare situas sur la insulo Ŭsel en Estonio. — Petu la broŝuron senpage de la eldonisto, la urbestro, laŭ adreso: Linnavalitsus, Kuressaare, Estonio.

BILDKARTOJ PRI LITOVIO. Serio de 4 kartoj, bone presitaj reproduktaĵoj. Teksto en lingvoj litova kaj esperanta. La tutan serion oni povas ricevi kontraŭ 1 resp. kupono de la ĉefdel. de IEL, S.ro L. Alseika, Ukmergė, Litovio.

INTERNACIONALO DE MILITREZISTANTOJ. 8 paĝa faldprospekto, kun mesaĝo pri suferoj de 493 militrezistantoj nuntempe malliberigitaj en diversaj landoj. Adr: 11, Abbey Road, Enfield, Middlesex Anglujo.

GDYNIA, VARSOVIO, KRAKOW, VILNO. Kvar belaj broŝuretoj pri la kvar ĉefaj urboj de Polujo, eldonitaj okaze de la jubilea kongreso. Senpage haveblaj ĉe L.K.K. de la 29a Universala Kongreso de Esperanto, Str. Chmielna 26, Warszawa.

HOTEL ESPERANTO, SELCE, JUGOSLAVUJO. Bela 4-paĝa ilustrita prospekto, senpage ricevebla de la hotelposedanto.

MONDFAMA KURACBANLOKO KARLSBAD, ĈEĤOSLOVAKUJO. Bela, 16-paĝa, riĉe ilustrita faldprospekto kun kolora kovrilo, senpage ricevebla de la eldoninto, Kurverwaltung, Karlsbad.

REGOLANDO JUGOSLAVIO — SLOVENIO (Drava Banusejo). Bele ilustrita faldprospekto, kun teksto: Somere tra Slovenio. Senpage havebla ĉe „Putnik”, Ljubljana.

LA NAJTINGALO. Esperantista kantaro, dua eldono, kompilita pere de „Suda Kruco”. Eld. Snep en v. Pierre A. S., Eindhoven, Ned. Prezo 10 c.

„LA SKOLTA MOVADO, ĜIA BEZONO DE INTERNACIA LINGVO. — Sven Alexandersson. Eld. Skolta Esperantista Ligo.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe ni:

<i>Verda Revuo</i> , monata ... jara f 1,50	<i>Literatura Mondo</i> , monata jara f 4,50
<i>Nia Gazeto, monata</i> „ f 1,35	<i>Niaj Vizaĝoj</i> , monata „ f 0,65
<i>Scienca Gazeto</i> , dumonata „ f 1,50	<i>Esperanto-Internacia</i> , mon. „ f 2,50
<i>Heraldo de Esp.</i> , semajna „ f 6,80	<i>Bulteno de I.S.A.E.</i> , dumo-
<i>The British Esp.</i> , monata „ f 1,20	nata, „ f 1,35

Specimenoj. Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimeno de *Literatura Mondo* kostas 20 cendojn. Ni ĝenerale havas ekzemplerojn de la aliaj kaj volonte sendas ekz. al iu ajn interesato kontraŭ 5-cenda poŝtmarko holanda aŭ egalvaloro.

SKRIBA KURSO por A. kaj B. (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto Simon Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. La Verda Stelo, Radioweg 45, Amsterdam-O.	JARKOTIZO POR 1937/1938. Argentino: 2 pes ; Aŭstrio: 3,20 ŝil; Belgujo: 14 fr ; Ĉeĥoslovakujo: 17 Kĉs; Ĉinujo 2 dol ; Danujo: 2,50 kr ; Estonio 2,50 kr; Finnlando: 25 finn.mark ; Francujo 12 fr ; Japanujo 2 jen ; Italujo 10 l ; Jugoslavio: 25 din ; Norvegujo: 2,50 kr ; Polujo 3,20 zl ; Svedujo: 2,20 kr ; Svisujo: 2,10 fr ; Usono 0,60 dol.
---	--

BONVOLU SENDI LA MONON POR „LA JUNA VIVO”:

Aŭstrio: F. Scheibenreiter, Hermannsgasse 31/26, Wien VII.

Belgujo: H. Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

Britujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London W.C.I.

Britujo: „Brita Laborista Esperanto Asocio”, p/a S.ro Nobes, 108 Well-don Crescent, Harrow, Middlesex.

Ĉeĥoslovakujo: Esperanto Asocio, Praha XIX, Uralské nám. 447. Poŝtĉekkonto 12.371.

Ĉinujo: Ĉina Esp.-Librejo, No. 14, lane 169, Carter Road, Ŝanhajo.

Danujo: S.ino M. Jensen, Galtrup, Erslev, ĝironumero 44593.

Estonio: Esperanto-Asocio de Estonio, Tallin, Poŝtkast 6.

Francujo: M. Matthieu, Dijon, 27, Place de la République, Côte d' Or.

Hungarujo: P. Balkanyi, Budapest, V., Nagy Sándor-u 6.

Japanujo: Japana Esp.-Instituto, Tokio, Hongo-Motomaĉi. Poŝtĉekkonto: Tokio 11325.

Jugoslavujo: P. Golobiĉ, Instruisto, Jesenice-Fuzine.

Latvujo: Ludmila Jevsejeva, Riga, Reformiatoru, iela 14, dz. 5.

Maroko: S.ino Irene Fink, 41 Bd. Moulay Jousef, CASABLANCA.

Norvegujo: Norvega Esp.-Ligo, p/a S.ro G. Johannessen, Skappelsgate 5. Hamar.

Polujo: Librejo-Eldonejo, Esp. Fako, S.ro N.Szapiro, Warszawa, Nowolipki Nr. 8. Poŝtĉekkonto: Warszawa 16.562.

Svedujo: John Karlsson, Berga, Vasterhaninge. Sveda ĝironumero 72295.

Svedujo: Eldona Societo Esperanto, Stokholm 1, Box 698, ĝironumero 578.

Svisujo: R. A. Dasen, 19a Avenue Riant-Parc, Genève ĝir. 1.6256.

Usono: Amerika Esp.-Instituto, 1111 Brooke Road, Rockford, Illinois.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan L. M. libro-liston!).